

Heinrich Heine,  
 Libro de l' kantoj, an-  
 taŭparolo je la tria eldono

Heinrich Heine,  
 Buch der Lieder, Vorrede zur drit-  
 ten Auflage

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Jen estas la fabel-arbar'!  
 Mi flaras tilio-floron!  
 Kaj la miriga luno-bril'  
 Sorĉigas mian koron.

Das ist der alte Märchenwald!  
 Es duftet die Lindenblüte!  
 Der wunderbare Mondenglanz  
 Bezaubert mein Gemüte.

Promenis mi, dum la irad'  
 Eksonis en la foro  
 De l' najtingalo rava kant'  
 Pri am' kaj am-doloro.

Ich ging fürbaß, und wie ich ging,  
 Erklang es in der Höhe.  
 Das ist die Nachtigall, sie singt  
 Von Lieb' und Liebeswehe.

De am', am-veo kantis ĝi,  
 De larmoj kaj ridado;  
 Jubilis ĝi triste, singultas pro ĝoj',  
 vekigis malnova songado.

Sie singt von Lieb und Liebesweh,  
 Von Tränen und von Lachen,  
 Sie jubelt so traurig, sie schluchzet so froh,  
 Vergessene Träume erwachen. -

Pluiris mi, dum la irad'  
 Mi vidis en la fono  
 Kastelon sur tre larĝa plac',  
 Altegis la frontono.

Ich ging fürbaß, und wie ich ging,  
 Da sah ich vor mir liegen,  
 Auf freiem Platz, ein großes Schloß,  
 Die Giebel hoch aufstiegen.

Fermitaj fenestroj, ĉie ĉi  
 Silento kaj malĝojego;  
 Kaj estis, kvazaŭ loĝis la mort'  
 Malantaŭ jena murego.

Verschlossene Fenster, überall  
 Ein Schweigen und ein Trauern;  
 Es schien, als wohne der stille Tod  
 In diesen öden Mauern.

Kaj antaŭ la pordo, jen kuŝis sfinks',  
 Skulptaj' de volupt' kaj teruro;  
 Leonan korpon havis la  
 in-kapa, kun-mama figuro.

Dort vor dem Tor lag eine Sphinx,  
 Ein Zwitter von Schrecken und Lüsten,  
 Der Leib und die Tatze wie ein Löw,  
 Ein Weib an Haupt und Brüsten.

La blanka vido de la in'  
 Parolis de voluptemo;  
 La mutaj lipoj volbis sin,  
 Ridetis de sindonemo.<sup>2</sup>

Ein schönes Weib! Der weiße Blick,  
 Er sprach von wildem Begehren;  
 Die stummen Lippen wölbten sich  
 Und lächelten stilles Gewähren.

...

...

---

<sup>2</sup>aŭ: Ridetis pri memdonemo.

Ĉe l' najtingala rava kant'  
 Ne povis mi kontraŭstari;  
 Kisinte ŝian vizaĝon mi  
 Ne povi plu ion fari.

Ekvivis la marmora bild',  
 La ŝtono ekĝemegis -  
 La ardon de miaj kisoj ŝi  
 Avide eltrinkegis.

Sufoke ŝi kisegis min,  
 Volupton postulante;  
 Kaj fine min ĉirkaŭprenis ŝi,  
 Per-unge min disŝirante.

Tortur' feliĉega! La dolĉa dolor'  
 Plenigis min senmezure;  
 Kaj dum la buŝo ravigis min,  
 La ungoj min lezis terure.

Kantadis la najtingal': „Ho am',  
 Respondu demandon mian:  
 Pro kio vi miksas kun mort-turment'  
 Feliĉon ĉiun vian?

Ho bela sfinks', ho solvu la  
 Enigmon malfacilan!  
 Pripensis mi pri tio ĉi  
 Jam tempon kelkjarmilan.“

...

Die Nachtigall, sie sang so süß -  
 Ich konnt nicht widerstehen -  
 Und als ich küßte das holde Gesicht,  
 Da war's um mich geschehen.

Lebendig ward das Marmorbild,  
 der Stein begann zu ächzen -  
 Sie trank meiner Küsse lodernde Glut  
 Mit Dürsten und mit Lechzen.

Sie trank mir fast den Odem aus -  
 Und endlich, wollustheischend,  
 Umschlang sie mich, meinen armen Leib  
 Mit den Löwentatzen zerfleischend.

Entzückende Marter und wonniges Weh!  
 Der Schmerz wie die Lust unermesslich!  
 Derweilen des Mundes Kuß mich beglückt,  
 Verwunden die Tatzen mich gräßlich.

Die Nachtigall sang: »O schöne Sphinx!  
 O Liebe! was soll es bedeuten,  
 Daß du vermischest mit Todesqual  
 All deine Seligkeiten?

O schöne Sphinx! O löse mir  
 Das Rätsel, das wunderbare!  
 Ich hab darüber nachgedacht  
 Wohl manche tausend Jahre.«

...

Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Vorrede zur dritten Auflage" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-03-31.

MR-121-1 / Arg-216-425 (2004-03-15 16:10:41)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, en la antaŭparolo al la tria eldono. La plua teksto de tiu ĉi antaŭparolo estas:

'Mi estua povinta diri ĉion tion ĉi en bona prozo... Sed kiam oni traegas la malnovajn poemojn, por priŝlifi ilin iom por nova eldono, tiam oni estas neatendite ree kaptata per la belsona kutimo de rimado kaj versritmo, kaj jen! Estas versoj, per kiuj mi malfermas la „Libron de l' kantoj“. Ho, Febo Apolono! Se tiuj versoj estas malbonaj, vi certe pardonos al mi... Ĉar vi estas ĉioscia dio, kaj vi scias tre bone, pro kio mi ekde multaj jaroj ne plu povis prefere okupiĝi pri versmezuro kaj samsoneco de vortoj... Vi scias, pro kio la flamo, kiu kiel brilega piroteknikaĵo delectis la mondon, subite devis esti uzata por multe pli seriozaj incendioj... Vi scias, kial ĝi nun en silenta ardo konsumas mian koron.... Vi komprenas min, granda, bela dio, kiu ankaŭ vi interŝanĝis foje la oran liron per la forta arko kaj la mortigaj sagoj... Ĉu vi memoras ankoraŭ pri tiu Marsio, kiun vi vive senhaŭtigis? Estas pasinta tio jam delonge, sed simila ekzemplo nun ree estus necesa.... Vi ridetas, ho mia eterna patro!'

Skribite en Parizo je la 20a de Februaro de 1839  
Heinrich Heine

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17), publikigita 1839.

Arg-216-424 (2004-03-15 16:02:35)

Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines Werk „Buch der Lieder“, in der Vorrede zur dritten Auflage. Der weitere Text dieser Vorrede lautet:

'Das hätte ich alles sehr gut in guter Prosa sagen können... Wenn man aber die alten Gedichte wieder durchliest, um ihnen, behufs eines erneuerten Abdrucks, einige Nachfeile zu erteilen, dann überschleicht einen unversehens die klingelnde Gewohnheit des Reims und Silbenfalls, und siehe! es sind Verse, womit ich die dritte Auflage des Buchs der Lieder eröffne. O Phöbus Apollo! sind diese Verse schlecht, so wirst du mir gern verzeihen... Denn du bist ein allwissender Gott, und du weißt sehr gut, warum ich mich seit so vielen Jahren nicht mehr vorzugsweise mit Maß und Gleichklang der Wörter beschäftigen konnte... Du weißt, warum die Flamme, die einst in brillanten Feuerwerkspielen die Welt ergötzte, plötzlich zu weit ernsteren Bränden verwendet werden mußte... Du weißt, warum sie jetzt in schweigender Glut mein Herz verzehrt... Du verstehst mich, großer schöner Gott, der du ebenfalls die goldene Leier zuweilen vertauschtest mit dem starken Bogen und den tödlichen Pfeilen... Erinnerst du dich auch noch des Marsyas, den du lebendig geschunden? Es ist schon lange her, und ein ähnliches Beispiel tät wieder not.... Du lächelst, o mein ewiger Vater!'

Geschrieben zu Paris, den 20. Februar 1839  
Heinrich Heine